

Ĉiam estas porkoj

Rakonto de Gertrud Everding

Tradukis Klaus Frieese

Li neis tion dum longa tempo, sed nun mi estas certa. Ne plu eblas dolĉigi tion.

Hardy estas porko. Sed verdire, tiu esprimas donas tro multe da honoro al tiu viro. Mi pli bone diras ke li estas monstro.

Mi renkontis lin cirkaŭ unu jaro ĉe la aŭtovoja restoracio, kie mi laboras kiel servistino. Hardy estis tiel nomanta 'kapitano de la vojo'. Li veturis grandegan kamionon.

Neniu povis rakonti historiojn tiel amuze kiel li. Li ŝatis ridigi la gastojn per tio. Kaj post mia malsukcesa edziniĝo kun Horst, kiu estis brutala alkoholulo, lia humura, amika maniero estis bona por mi.

Unu tagon mi kunprenis lin en mia loĝejo. Kamionistoj havas laŭleĝe devigajn ripozperiodojn. La polico ne prenas tion malserioze. Sed neniu povas kontroli kiel kamionistoj pasigas tiun tempon. Ni pasigis tiun tempon en la lito, sed ne por dormi. Esti neforgesebla sperto. Hardy estis vere bona. Mi neniam antaŭe spertis ion similan kaj mi decidis teni lin por ĉiam.

Se mi ne estus membro de la asocio por besta bonfarto, mi eble ne prenis la okazintaĵon tiel serioze, sed tial mi ne povas toleri tiajn terurajn aferojn. Heinz estis la unua, kiu rakontis al

mi pri la suspektindaj negocoj de Hardy, sed mi ne kredis lin. Li estas ankaŭ kamionisto kaj verŝajne iom envias la bonajn enspezojn de Hardy.

Mia amiko ŝatas paroli pri sia enspeziga laboro. Li ankaŭ montris tion. Li ĉiam estis bone vestita. Lia leda jakso, importita el Usono, devis esti verŝajne tre multekosta ĉar li estis ekstreme zorgema por certigi, ke ĝi ne estis ŝtelita de li. Ankaŭ same valora estis verŝajne lia svisa brakhorloĝo, ĉar li ĉiam klarigis ĝianjn avantaĝojn al ĉiu, ĉu oni demandis aŭ ne. Li donacis al mi veran diamantan ringon. Mi estis tiel feliĉa, ke mi pensis, ke mi neniam estis tiel feliĉa en mia vivo.

Kelkfoje Hardy menciis, ke li volis rezigni pri veturado. Tiam li ŝatus lui kun mi aŭtovojan restaŭracion, plej eble ĉe loko, kie ofte estas trafikŝtopiĝo. Li pensis ke tie oni povus iĝi riĉa. Do ni konstruis fantazikasteloj kaj ŝajne alproksimiĝis la realigo.

Nur estis strange, ke li ĉiam parkis sian kamionon iom pli for de la aliaj. Foje li ne aperis. Li asertis ke li devis fari urĝan transporton. Alia kolego vidis lin je malfrua vespero sur parkejo en arbaro.

Hardy dormis sur la stirseĝo kaj la kolego ne volis ĝeni lin. Sed strangaj bruoj venis de la malantaŭ de lia kamiono. Tio sonis kiel blekado de ŝafoj, sed tiel malesperaj kaj lamentaj, ke ili preskaŭ havis ion homan en si.

Mi ignoris kion li rakontis. Mi ne povis imagi ke mia amiko faris tian malbonan. Sed ankaŭ aliaj kamionistoj flustris pri malpermesitaj transportoj de bestoj.

Kiam mi alfrontis Hardy pri tio, li indigne neis tiajn aĉajn negocojn. Mi ankaŭ ne volis kredi ke li faris tian malbonon, ĉar tiam ĉio inter ni estus ruigita. Ĝis antaŭhieraŭ, tiam mia bela sonĝo frakasiĝis.

La polico kaptis lin apud la pola limo kun tute troplena konterero plena de preskaŭ frenezaj porkoj. Li ĵus provis rekapti unu de la kompatindaj estaĵoj, kiu volis liberigi sin sur la parkejo el la horora kaptiteco.

Hodiaŭ matene mi vizitis lin en malliberejo. Lia vizaĝo estis cindrogriza dum li rakontis al mi pri la transportoj.

"Estas bone, ke nun estas la fino de tiu laboro," li komencis malgaje "mi jam sonĝas nokte pri ĉiuj tiuj kompatindaj estaĵoj. Ili akuzas min per ĉiuj de siaj multaj vundoj, siaj okuloj, kiuj esprimas malesperon, kaj per siaj rompitaĵoj membroj. Ofte ili mortis preskaŭ pro soifo kiam mi atingis Pollandon, precipe en somero. Sed miaj komisiintoj malpermesis al mi zorgi pri la bestoj. Mi ĉiam diris al mi, ke se mi ne faras tion, estas alia kiu transprenas la transporton. Ĉu mi rajtas, Ilse? Kaj mi ja ankaŭ gajnis multe da mono per ĝi. Mi pensis ke mono ne malbonodoras. Kaj la virinoj ja preferas tiajn virojn, kiuj povas oferti ion. Vi ja ankaŭ nur akceptis min pro ..."

Li haltis, ĉar mi rigardis lin terugite.

"Sed la krioj persekutos min dum mia tuta vivo," li daŭrigis.
"Mi devus esti sciinta tion. Io tia ne devus resti sen puno."

Lia voĉo iĝis mallaŭta kaj sonis senespera. Li sidis kolapsita kiel amaso da mizero antaŭ mi. Kaj mi atendis por vidi ĉu kompatato estingus en mi. Sed tio ne fariĝis. nur abomeno kaj granda malpleneco. Sen rigardi malantaŭen, mi forlasis la malliberejon.

Hodiaŭ en la aŭtovoja restaŭracio estas nekutima aktiveco. Ĉiuj parolas pri Hardy. Mi kaŝe rigardas la diamantan ringon sur mia mano. Ĉu mi devas fordoni ĝin ankaŭ? En la malantaŭo sidas juna viro kun mezlogaj nigraj hararo. Li estas malriĉe vestita kaj ne partoprenas la konversacion. Li trinkas sian kafon malgaje. Verŝajne lia laboro kaŭzas problemojn. Kiu scias? Povas ja esti ke li estas la sekva

Ĉiam estas porkoj.

Germana fonto:

<https://www.literadies.de/natur.htm#schweine>

Notoj de la tradukanto pri la vorto 'Porko':

La vorto 'Schwein' (porko) havas plurajn signifojn en la germana lingvo.

Unue, oni pensas pri la hejma porko, kies viandon multaj ĝuas. La bonŝanca porko '**Gücksschwein**' estas figuro, kiun oni ofte donacas por Novjaro. La esprimo '**Er hat Schwein gehabt**' (Li havis porkon) signifas, ke iu estis bonŝanca.

Porkoj ŝatas ruliĝi en koto. Eble tial ankaŭ ekzistas la termino '**Dreckschwein**' (malpura porko). En kelkaj religioj, la porko ankaŭ estas konsiderata malpura, kaj la konsumado de porkaĵo estas eĉ malpermesita.

La idiomaĵo '**Jemand ist ein Schwein**' (Iu estas porko) povas esti komprenata kiel insulto aŭ ofendo. Ĝi ofte estas uzata por priskribi homojn, kiuj kondutas aparte malestiminde.